# Informilo

Monata revuo
Maandelijks tijdschrift

6a jarkolekto, n-ro 5
junio 1986

A T E N T I N D A Ĵ O J

## G R A V A   A L V O K O

Sekve al divers-flankaj petoj kaj instigoj, FEL-estraro proponas organizi en la daŭro de la JUBILEA JARO, aron da lokaj publikaj programoj fare de la diversaj lokaj grupoj en kiuj la estraro volas aktive kunlabori.

Ni do insiste petas la grupajn respondeculojn prikonsideri la eblecon organizi po unu programon kaj prezenti ĝin en la ĝenerala kunsido kiu okazos la 11-an de oktobro.

Je tiu okazo ni povos ĉiuj kune klopodi koncerti la tuton kaj plani la sekvotan labormanieron.

Pretaj proponoj kompreneble povas esti jam senditaj al la sekretario p/a Esperantocentro.

Pro tio la estraro anticipe dankas al ĉiuj bonvolemaj kunlaborontoj.

Venonta estrarkunsido : 13 09 1986 ekde 08.30 h.

**Informilo**, kadro-revuo de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. • Jarabono: 150 fr. • Kontoj: 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43 • Respondeca eldonanto (*verantwoordelijke uitgever*): Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel.

## E S T R A R O kaj L A B O R G R U P O J

1. KUNORDIGADO : Ivo DURWAEL (prezidanto 03/440 30 92
Paul Gilsonlaan 5, 2520 EDEGEM

Jan BOVENDEERD (sekretario)
Speeltuinlaan 14, 2510 MORTSEL

2. FINANCOJ K. ADMINISTRADO (+ turismo + "taksi stop" + eldonoj)
Erik D'HONDT (estrarano) 053/77 44 97
Wilgstraat 25A, 9440 EREMBODEGEM

Paul PEERAERTS (direktoro) 03/234 34 00
Baron Dhanislaan 13, 2000 ANTWERPEN
Roland ROTSAERT ( estrarano) 050/33 00 04
Visspaanstraar 97, 8000 BRUGGE
050/33 00 04

Christian DECLERCK (kom. pri literaturo/eldonoj)
Amerikalei 135/2, 2000 ANTWERPEN

3. INFORMADO Edward SYMOENS (estrarano) 03/666 62 66
GAZETARA SERVO Putsesteenweg 131 A, 2180 KALMTHOUT

Herman DECEUNINCK (kom. gazetara servo) 02/360 17 22
Villalaan 1 b.4, 1500 HALLE

4. INSTRUADO - PROPAGANDO - EKSPOZICIOJ - KONGRESOJ

Marc VAN DEN BEMPT 016/20 14 53
Duisburgsestraat 12, 3030 LEUVEN-HEVERLEE

Albert CLAESEN 011/32 36 03
Zonnebloemstraat 7, 3610 DIEPENBEEK

Ray GERARD
Antwerpsesteenweg 24, 2250 BROECHEM

5. GRUPA AGADO Hilde VANINGELGEM-VANDRIESSCHE (estrarano) 053/70 50 11
Arbeidstraat 21, 9300 AALST

Trees DOOMS (prelegvojaĝoj) vidu P. Peeraerts

Jules VERSTRAETEN ( OMBUDSMAN) 03/827 66 43
St. Bernardsesteenweg 1078, 2710 HOBOKEN

Rilatoj kun FLEJA : Hilde VANINGELGEM.



## P R O T O K O L O

pri la estrarkunsido de sabato 7-a de majo 1986 en Antverpeno

Ĉeestas : Erik D'Hondt (ED), Ivo Durwael (ID), Paul Peeraerts (PP)
Roland Rotsaert (RR), Edward Symoens (ES) Hilde Vaningelgem (HV)
kaj Jan Bovendeerd (JB)

Prezidas : ID

Protokolas : JB

Komenca horo : 08.45 h.

---

I. <u>KUNORDIGADO</u>

1. La protokolo pri la estrarkunsido de 19 04 1986 estas unuanime aprobita.

2. <u>Membraro</u> :

| Membraro | | Abonoj | |
|---|---|---|---|
| FEL : | + 42 | ESPERANTO PANORAMA | : - 98 |
| FLEJA : | + 5 | INFORMILO | : - 14 |
| UEA : | + 9 | JEN | : - 13 |
| | | KONCIZE : | senŝanĝa |
| | | KONTAKTO | : + 15 |
| | | HEROLDO | senŝanĝa |
| | | MONATO | + 3 |

3. JB preparis projekton de letero destinita al "Provincaj Ko isionoj por Konsiloj rilate al Lok-nomigoj". (Provinciale Commissies van Advies voor Plaatsnaamgeving), por atentigi ilin pri la 100-jariĝo de Esperanto kaj por peti ilian atenton kadre de ilia programo por starigoj de statuoj aŭ por nomigi novajn stratojn kaj/aŭ placoj. La teksto estas aprobita, sed la sendo de la letero prokrastita ĝis la pretigo de la nova leterpapero.

4. Kadrokursoj

4.1. ES sendis nian preparan tekston rilate al la internaciigo de niaj kadrokursoj al UEA por dissendado. Tamen UEA verŝajne ne faris tion Almenaŭ ES ricevis eĉ ne unu solan reagon.

4.2. FEL organizos - intencas organizi - :
- kadrokurson por instruontoj
- " pri Transakcia Ananlizo.

II FINANCOJ

5. Librovermeto :
Ĝis nun, depost ĝia realiĝo, LIBROVERMETO aperis nur 2 aŭ 3 fojojn. Tio jam sentiĝas en la librovendado, kies ciferoj rimarkeble malpliiĝis. LIBROVERMETO do ne estas lukso, sed nepra bezono.
ED okupiĝos pri la problemo.

6. ESPERANTO PANORAMA

6.1. La venonta numero estos la 100-a. Por tiu okazo PP, kiu iniciatis ĝin, komence private, poste kadre de BEF kaj fine por FEL, faros historian superrigardon kaj aperigos ĝin en venonta numero.

6.2. PP plue porponas samtempan tre favorprezan vendadon de serio libroj kies listo aperos samokaze.

6.3. Rilate al la revuo mem, surtabliĝas propono rilate al starigo de komisiono kiu okupiĝu pri la enhavo. Tiu ĉi povus esti plikompletota per regula aperigado de feri-, vojaĝ- k.s.- eblecoj.

La membroj ŝajnas esti kontentaj pri la enhavo. PP tamen ne. Li opinias ke mankas vera redakta politiko. Tekstoj ne mankas, sed jes la necesa ekvilibro. ID vidas solvon en la trovado kaj kunigo de redaktoroj pri specifaj temoj.

Diversflanke esprimiĝas la deziro aperigi ankaŭ Esperantajn tekstojn. PP atentigas pri tio, ke origine ESPERANTO PANORAMA estis destinita al ne-esperantistoj kaj havis ĉefe propagandan celon.

Decidiĝas klopodi kunmeti liston da nomoj de pretaj kaj kapablaj kunlaborantoj pri diversaj temoj.

Plie estos ekzamenata la ebleco pri aperigo de kalendaro pri interesaj okazajoj.

7. Eldona agado.
En la serio SATFETO aperos nova libro ĉirkaŭ septembro proksima. Temas pri nova eseo de Waringhien. Poste, fine de la jaro, aperos denove detektivromano de Deck Dorval.
Petate estas kiel eble plej multe propagandi ilin.

III PROPAGANDO - INFORMADO

8.1. ES raportas ke li ricevis leteron de iu S-ro Hermans de la Instituto pri Modernaj Lingvoj el Hasselt kun la sciigo ke li volas organizi Esperanto-kurson. La letero estas transsendita al Albert Claesen, kiu plue okupiĝos pri tiu afero.



8.2. ES baldaŭ renkontos S-ron Meysen, produktisto ĉe BRT-TV (Servo pri Sciencoj)

8.3. Jubilea Jaro

8.3.1. Diversflanke ŝajne la homoj atendas apartan manifestacion interne de la movado pri la jubilea jaro. (BRT- TV kaj Radio, la Antverpena urbestro, kiu cetere promesis apogi ion tian) k.a.
Proponiĝas alvoki la diversajn grupojn al kunlaboro en serio da organizajoj.
JB lanĉos la ideon pere de la kovrilpaĝo de INFORMILO.

8.3.2. Gazetara Konferenco.
ID proponas prezenti parteton el "Kia Miksaĵo" okaze de la planita gazetara konferenco. La problemo tamen estas ke ni ne disponas pri profesiaj aŭ almenaŭ bonaj amatoraj aktoroj, nek pri reĝisoro.
Esprimiĝas ideo pri propono al teatra lernejo (Herman Teirlinck ekz.), sed kiom kostos tia entrepreno ?
Ni ankaŭ povus fari provon, ekzemple okaze de iu distra klubvespero.
Fine decidiĝas serĉi kapablulo(j)n pere de anonco en ESPERANTO PANORAMA.

8.4. DOMSTILO
ID prezentas la novan leterpaperon kaj koverton portantajn la novan emblemon.
Post diskuto, la projekto estas aprobita.
Ĝi estas publikigota unue pere de ESPERANTO PANORAMA, poste pere de INFORMILO.
La grupoj estas insiste petataj akordiĝi kun FEL kaj uzi la novan emblemon en ĉiuj siaj publikajoj.
FEL ekzamenas la eblecon je tre malmultekosta presado de la diversgrupa leterpapero k.s.

8.5. La poste sekvonta gazetara konferenco, kiu verŝajne okazos en oktobro, estos okazo por prezenti la novan leterpaperon, la novan kurson (ESPERANTO PROGRAMITA), faldfolion kaj informbroŝuron

8.6. ESPERANTO PROGRAMITA aperos en formo de unu novaranĝita libro kun ilustrajoj + sonbendo en skatolo.

9. DIVERSAĴOJ

9.1. Propaganda faldfolio
En Maastricht, okaze de la Trilanda Renkontiĝo je la 4-a de majo,

disdoniĝis kelkmiloj da ekzempleroj de faldfolioj nederland- franc- kaj germanlingvaj.
La organizintoj petis de FEL kontribuon en la kostoj en formo de aĉeto de 3000 ekzempleroj.
Aprobite.

9.2. Rilate al la impostado de interezoj en rilate kun niaj depon-kontoj, PP petos pliajn informojn ĉe la impostaj servoj.

9.3. Blankenberge - Kongreso
Nenio nova.

9.4. De Petro De Smedt venis propono kontaktiĝi kun F-ino Middelkoop por kunmeti prestiĝan vortaron surbaze de vortprovizo de PI.
Post diskutado, la estraranoj opinias ke la projekto estas finance ne-ebla.

9.4. Por pli bone konatiĝi kun la Esperanto-Centro, ID proponas "labor-kunvenojn" en la feria periodo, cele al helpado en la ĉiutaga laboro de la centro.
Proponiĝas vendrede 22-a de aŭgusto.

9.5. PP serĉas iun kapablan kaj pretan por enordigi la stud-bibliotekon de FEL.
Interesito(j) sin anoncu ĉe P. Peeraerts.

9.6. Estrara laborkalendaro :

Proponiĝas estonte kunveni la duan anstataŭ la unuan sabaton de la monato, ĉiufoje ekde 08.30 h.

Datoj : 13 09 1986 : - estrarkunsido
11 10 1986 : - antaŭtagmeze : estrarkunsido
post-tagmeze : ĝenerala kunsido
08 11 1986 : - estrarkunsido
13 12 1986 : - estrarkunsido.

Fino de la kunsido : 13.00 h.

JB

---



P R O T O K O L O

pri la kunsido de la komisiono de FEL pri informado, instruado kaj aliaj -adoj

---

sabaton 7.6.1986, 14h - 18h, Esperanto Centro Antwerpen.
Ĉeestas : Albert Claesen (AC), Petro De Smedt (PDS), Ivo Durwael (ID), Marc Vanden Bempt (MV, protokolanto)

1. Domstilo FEL

- HF faris proponon por leterpapero kaj koverto de FEL : emblemo Esp.o-1987, speciala litertipo por la nomo de FEL kaj la cetera parto de la titolo, k.s.
  Principe ĝi estas bona ; la komisiono donis kelkajn rimarkojn al ID, kiu kun HF kaj s-ino Strijdonck (de la reklamagentejo) ĝin ankoraŭ lundon priparolos.
- La venonta numero de Panorama estos ankaŭ jam en la nova stilo.
- Ankaŭ la lokaj grupoj en Flandrio adaptu tiun stilon.
  Pri tio konsentis i.a. la 4 ĉeestantoj, kiuj ĉiuj estas tre proksimaj ankaŭ al propraj lokaj grupoj. Tiel ĉiu reklamo pri Esperanto en Flandrio havos saman aspekton.
  FEL disponigos al la grupoj presaĵojn je eksterkonkurenca prezo, kondiĉe ke ili estu (kun teksto k.a. de la loka grupo mem) ellaborita en la nova stilo.
  Detaloj pri la stilo estos poste publikigataj.
- Uzenda por leterpapero, kovertoj, afiŝoj, revuo, k.a. ...
- Dum la venontaj kelkaj monatoj pretiĝos faldfolio, nova Esperanto programita, leterpapero kaj koverto de FEL en la nova domstilo.
- S-ro Texier el Francio havas proponon por la teksto de la faldfolio.

2. Esperanto Programita

- ID sendis siajn rimarkojn al ses personoj ; + nun al PDS.
  Reagoj jam revenis de du el ili.
- la skatolo povos esti kartona (libro + 2 kasetoj) aŭ simpla plasta folio.

- Desegnaĵoj : PDS petos al desegnisto fari 16 desegnojn por la nova libro ; sufiĉe urĝas.

3. Instruistoj, diplomo

- Antaŭe estis du proponoj.
- Ni nun decidis ke la diplomo en la nuna momento ne estas tre grava. Ni fakte bezonas instruistojn ; diplomo kontraŭe kondukos al selekto el la jam malgranda instruistaro.
- Ni jes gardas la ideon pri kadrokursoj por instruistoj, sed nun ne tuj ellaboros ilin. Eble venontjare.
- AC serĉas instruiston por oficiala kurso en Hasselt : du horojn vespere.

4. Propagando, informado

- Ni ne konsilas grandan reklamkampanjon en naciaj gazetoj, pro la negativa rezulto de provo en Leuven.
  Aliflanke ni jes provos uzi negrandajn (lokajn) gazetojn.
- La kampanjo komenciĝos per gazetara konferenco pri i.a. la nova Programita.
  Tuj poste ĉie en la lando ni devos proponi la libron, eble kune kun la Prisma-vortaro, al plej multaj vendejoj.

5. Diversaĵoj

- ID, same kiel ĝis nun, kunordigos la tutan kampanjon.
- ID ankaŭ anoncas ke en septembro aŭ oktobro li intencas prezenti kurson pri transakcia analizo, por gvidantoj el la movado. La legantoj de informilo estas tiel avertitaj.
- AC prezentis sufiĉe malmultekostan manieron por fari grandformataĵn kaj profesiaspektajn titolojn. Ekz. 320 fr por 'ESPERANTO', 2 metrojn longa teksto.
  Informojn ĉe AC.



I N T E R H O M A J   R I L A T O J (daŭrigo)

K O N T A K T O J

Jam antaŭ jarcentoj okazis eksperimento kun ĵusnaskitoj, kiuj vivis tre izolitaj, en fizike idealaj cirkonstancoj, sed senigitaj de korpaj kontaktoj. La idoj mortis, unu post la alia, sen konstateblaj korpaj malsanoj. La samon oni konstatis ekzemple denove en Vjetnamio, kiam oni provis havigi al amaso da plej junaj orfoj nur manĝaĵojn, sed ne korpan kontakton. En klinikoj, oni konstatis ĉiam denove, ke neglektitaj beboj ne nur mense, sed eĉ fizike postrestas en sia kreskado. La ido bezonegas korpan kontakton. Pli bone estas frapoj kaj pinĉoj ol resti senigita de iu ajn kontakto. Tial infanoj, kiuj ne ricevas atenton, kiujn ili deziras, komencas "misagadi", t.e. fari aferojn kiuj devigas nin atenti pri ili, frakasi objektojn, bruegi, ktp. Se eĉ tio ne helpas ili retiriĝas en sia propra mondo : fariĝas trotimemaj, fermitaj, maliniciatemaj.

La sama esenca bezono je kontaktoj ankoraŭ ekzistas ĉe plenkreskuloj, sed ni ankaŭ kontentas pri t.n. psikologiaj kontaktoj : "Vi faris belan prelegon !" ; "Regas bona etoso en via grupo."

En ĉi tiu kunteksto vi jene komprenu la titolan vorton: kontakto estas ĉiu ajn ago per kiu vi rekonas la ekziston de alia persono. Ekzemple : "Bonan vesperon, Sinjoro, Kiel vi fartas ? " ; "Vi faris stultaĵon ", sed ankaŭ manpremo, kapsigno, ŝultrobato ktp.

La malgrandaj tuŝoj estas tre plaĉaj al la plimulto da personoj kaj kreas amikan etoson. Tamen pro nia edukiteco, la plimulto havas Gepatran bremson kontraŭ multe da korpaj kontaktoj. Ankaŭ tion oni devas konsideri (Ekz. Viro ne rajtas kisi irananinon !)

Sed iom da sincera aprezo supozeble estas bonvena al ĉiu ajn.
"Dankon, amiko."
"Tio estas interesa prelego."
"Via Esperanto progresas"
"Vi skribis interesan artikolon."

Tia reago kutime estas Gepatra/Infana. Pli precize, ĝi estas de Protektema Gepatra al Natura Infana. La unua reago de tiu kontakto estas plaĉo. Tuj poste ofte aktiviĝas la Kritikema Gepatro, kiu interne diras al la "Adaptita Infano" : "Atentu, oni volas manipuli vin ! La instruisto diris al ĉiu, ke li progresas, ankaŭ al tiu stultulo apud mi. Mi ne fidas lin. Li nur volas atingi ke ni daŭrigu la kurson laŭ lia plano."

Se vi ŝatas eviti tian malfidon, vian laŭdon akompanu "Plenkreskula"

informado kiel pruvo de sincereco. Ekz. "Via prelego katenis la atenton. Kutime pluraj membroj foriras dum la paŭzo, aŭ komencas klaĉi inter si. Tio nun tute ne okazis kaj tio estas escepto !"

La ignoro de persono estas pli malagrabla ol kritiko. Mi persone konas homojn kiuj rakontis sian indignegon, ĉar prezidanto de iu klubo plurfoje forgesis saluti ilin. Je mia bedaŭro, mi konas kelkajn personojn, kiuj venis unuafoje al mia klubo kaj restis iom izolitaj : ili neniam revenis. Frans Van Dooren rakontis al mi pri sia profunda seniluziiĝo, ĉar je lia unua reveno al LA VERDA STELO, li spertis ke neniu rekonis lin aŭ atentis pri li.

Sed ankaŭ pri kritikoj ni devas cerbumi. Esti severa, en kurso ekz. povas esti formo de aprezo : "Mi ja scias, ke vi atingi povas pli : montru tion !" La sinteno de kursgvidanto, kiu permesas ĉion kaj cedas al ĉio, povus soni ĉe la lernantoj kvazaŭ neglektemo. "Ne tro gravas por mi, ĉu vi progresas aŭ ne. Tio ne interesas min !"
Ĝi foje ankaŭ venas de profunda malestimo de la instruisto. "Kion mi atingu kun ĉi tiu stulta bando." Sed sendube la lernanto spertas tian malaprezon.

Tamen, por krei bonan etoson oni ankaŭ pripensu ke ĉiam eblas interpreti saman konstaton en du manieroj. Ekzemple :
" Eĉ 30 % de la lernendaj vortoj vi ne konas !"
aŭ
"Vi jam konas 70 % ... "
Precipe en Esperantokurso, kiu nur viveblas dank' al entuzisamo, tiu ĉi last-forma instigo ofte necesas !

Mi resumu jene : pozitiva aprezo instigas al entuziasmo, pli da amikeco, pli granda laborkapacito. Kritiko, sed precipe ignorado kondukas al nesocia, neadaptita agadmaniero.

Ivo Durwael.



## P R O V E R B A R O

F. Roose. daŭrigo

| | |
|---|---|
| Por saĝulo sufiĉas aludo. | Een goed verstaander heeft maar een half woord nodig. |
| Esti inter martelo kaj amboso. | Tussen twee vuren zitten |
| Traflugis anĝelo preter orelo. | Er gaat een dominee voorbij. |
| Amikeco aparte, negoco aparte. | Zaken zijn zaken. |
| Aprila vetero, trompa aero. | April doet wat hij wil. |
| Okulo ne atentas, dorso eksentas. | Wie niet horen wil moet voelen. |
| Plibono estas la malamiko de bono. | Het betere is de vijand van het goede. |
| Brogito eĉ sur malvarman akvon blovas. | Door ondervinding wordt men wijs. |
| Butumi iun malvaste. | Iemand kort houden. |
| Lia cerbo iras promeni. | Hij is in de bonen. |
| Longe ĉerpas la kruĉo, ĝis fine ĝi rompiĝas. | De kruik gaat zo lang te water tot ze breekt. |
| Al donacita ĉevalo oni buŝon ne esploras. | Men moet een gegeven paard niet in de bek kijken. |
| Homo projektas, Dio direktas. | De mens wikt, God beschikt. |
| Post domaĝo venas saĝo. | Door schade en schande wordt men wijs. |
| Draŝi fojnon aŭ silentigi virinon. | Water naar de zee dragen. |
| Por dronigi hundon, oni nomas ĝin rabia. | Wie een hond wil slaan, heeft licht een stok gevonden. |
| Kiu batas edzinon, tiu vundas sin mem. | Wie zijn neus schendt, schendt zijn aangezicht. |
| Ofte de kaŭzo senenhava venas efiko plej grava. | Kleine oorzaken hebben soms grote gevolgen. |
| Pli bone estas eviigi ol kompatigi. | Beter benijd dan beklaagd. |

| | |
|---|---|
| Kiu ne pekis ? Kiu ne eraris ? | Het beste paard struikelt wel eens. |
| Ankoraŭ la ezoko ne estas sur la hoko. | Het hangt nog in de lucht. |
| Ŝiriĝis la fadeno sur la bobeno. | Er is een kink in de kabel gekomen. |
| Fadeno iras kien kudrilo ĝin tiras. | Men moet gehoorzamen, of men wil of niet. |
| Trafi el la fajro sub flamon. | Van de regen in de drup komen. |
| Ne fanfaronu irante fanfaronu revenante. | Men moet geen mosselen roepen eer men aan wal is. |
| Inter diro kaj faro estas maro. | Beloven en doen is twee. |
| Forĝu feron dum ĝi estas varmega. | Men moet het ijzer smeden als het heet is. |
| Li ne eltrovis la filozofian ŝtonon. | Hij heeft het buskruit niet uitgevonden. |
| Bona vino al la fino. | Lest best. |
| For de la okuloj, for de l' koro. | Uit het oog, uit het hart. |
| Granda frakaso en malgranda glaso | Een storm in een glas water. |
| Por malfrua gasto restas nur osto. | Hij vindt de hond in de pot. |
| Ne ekzistas fumo sen brulo. | Geen rook zonder vuur. of Men noemt geen koe bont, of er is een vlekje aan. |
| Li esploris iom la fundon de la glaso. | Hij heeft te diep in het glaasje gekeken. |
| Kiu garantias, trankvilon ne scias. | Borgen baart zorgen. |
| Kiu nenion valoras, plej multe sin gloras. | Holle vaten klinken het hardst. |
| Ĝi jam staras al mi en la gorĝo. | Ik heb er meer dan genoeg van. |

---

iam daŭrigota.